

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo Numero 1 / 2023



Esperantistoj partoprenis la mondrekordon en laŭtlegha stafeto en BIB Sophia en Skarbeko

En tiu eldono

- Kreado de KLUBo (ULB/VUB)
- Vizito de artaĵoj en la metroo
- Mondrekordo laŭtlegha stafeto
- Vizito de artaĵoj en la metroo
- Tutmondaj Voĉoj
- Kongreso de fervojistoj
- Ni ĉiuj estu Tutmondaj Voĉoj
- Nia plantangulo
- ...

Vivu
Ukrainio



Tagmanĝo ĉe Bombay Inn kaj vizito de artaĵoj en la Metroo



Eventoj kiuj okazis antaŭ nelonge ĉe EBG (iuj ankaŭ rete)

Prelego de
Bernard-Reĵis LARUE

Kartografio (7)
Ĝermanaj mapoj
ĉirkaŭ la 16a
jarcento

Mardon la 24an de Januaro
je la 18a30

En De Pianofabriek
... kaj interrete per Zoom



Babilemaj Picoj post Ludvespero



Biergustumado kun Valère



Kartografio 8 : IATO - Italaj Atlasoj laŭmende kummetitaj
Prelego de Bernard-Reĵis Larue




Babilemaj Spagetoj ĉe Resto 26

42a ELDONJARO. Aktuala estis fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de EBG - Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita la 10an de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo « Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge » kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: JM Nicolas de Buyl: aktuala@esperantobruselo.org ; Aktuala elŝutebla: sites.google.com/site/ebgaktuala/ ;

Prezidanto: Bernard-Reĝis LARUE : prezidanto@esperantobruselo.org , Kasisto: Jan Amadori : jan.amadori@gmail.com

Sekretario: Ivo DE KEYZER : sekretario@esperantobruselo.org, Informoj/kursoj: Françoise Pellegrin: fransuaz@esperantobruselo.org Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org

Abono kaj membriĝo: Vidu la kotiz-tabelon, konto: IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC: TRIOBEBB de Esperantista Brusela Grupo, EBGa retejo: www.esperantobruselo.org, Fesjbukpaĝo: Esperanto Bruselo, group-io: Esperanto en Bruselo, Kunvenejo: « De Pianofabriek », Rue du Fort-straat 35, 1060 Bruselo,  Parvis de St-Gilles/St-Gillis

A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn rete sur la [Kalendaro de la Brusela grupo sur nia retejo](#)

Kursoj kaj kunvenoj okazas ĉiumarde en De Pianofabriek, 35 rue du Fortstraat, 1060 Bruselo.

Informoj ĉe fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28





EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

Porkomencanta kurso kun Adam Brooking ekde la 31a de Januaro 2023 ĝis la 20a de Junio 2023.

La 2a sesio de tiu kurso okazos ĉiumardon **krom** la 4a kaj 11a de Aprilo, 2023.

Normale en Casablanca 1 (De Pianofabriek). Informoj : kresko@esperantobruselo.org aŭ 0478 072 151

APRILIO

Mardo la 4a	18:30 - 20:00	  Paroliga Vespero en la trinkejo de De Pianofabriek
Mardo la 11a	18:30 - 20:00	  Paroliga Vespero en la trinkejo de De Pianofabriek
Mardo la 18a	18:30 - 20:00	Aŭskultado de fragmentoj el Varsovia Vento
Sabato la 22a	11:00 - 15:00	Promenado en Sonia Arbaro por spekti hiancintajn flortapiŝojn , eble poste Babilema Manĝo. Stacio Montgomery ĉe tramo 44 kiu foriras je la 10:44 aŭ je la 11:00 ĉe la 8a Haltejo « Trois Couleurs / Drie Kleuren »
Mardo la 25a	18:30 - 20:00	Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri : JWST James Webb Space Telescope

MAJO

Mardo la 2a	18:30 - 20:00	Paroliga vespero laŭ temo decidota
Mardo la 9a	18:30 - 20:00	Paroliga vespero laŭ temo decidota
Mardo la 16a	18:30 - 20:00	Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri Kartografio (9) : Brabanta skolo (1)
Mardo la 23a	18:30 - 20:00	Prelego de Marc Demonty pri « la kukolo kaj aliaj kantbirdoj »
Mardo la 30a	18:30 - 20:00	Paroliga vespero laŭ temo decidota

JUNIO

Sabato la 3a	10:00-15:00	Promenado por observi kaj aŭskulti birdojn en Dilbeek-o , poste Babilemaj Spagetoj
Mardo la 6a	18:30 - 20:00	Paroliga vespero laŭ temo decidota
Mardo la 13a	18:30 - 20:00	Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri Kartografio (9) : Brabanta skolo (2)
Mardo la 20a	18:30 - 20:00	Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri : Pacistoj kiuj estis esperantistoj
Mardo la 27a	18:30 - 20:00	Sezonfina manĝo en loko difinenda. Bonvolu fari proponojn

JULIO - AŬGUSTO

Someraj Mardoj	18:30 - 20:00	Eble iuj paroligaj vesperoj povas okazi ie sur la St-Gilisa Antaŭpreĝejo placo
----------------	---------------	--

Paĝo 2a : Antaŭ nelonge ĉe EBG

Paĝo 3a : Kolofono /Agendo

Paĝo 4a : Enhavo

Vorto de la Prezidanto

Paĝo 5a : En la movado

• Ĉebalta E-ista Printempo en Mielno (PL)

• Someraj Kongresoj

Paĝo 6a : • KLUBo en Liberaj Universitatoj de Bruselo

Paĝo 8a : Tagmanĝo kaj vizito de artaĵoj en la metroo.

Paĝo 13a : Mondrekordo pri laŭtlekada stafeto

Paĝo 15a : Ni ĉiuj estu Tutmondaj Voĉoj

Paĝo 17a : Memorigoj

• Pri la klubokotizoj

• IFEF-Kongreso - Gravaj informoj

Paĝo 18a : Floroj kiuj nombras la helajn horojn

Paĝo 19a : Nia plantangulo Centaŭreo cejano / Cejano

Paĝo 20a : Venontaj eventoj ĉe EBG

Vorto de la prezidanto

Karaj,

Jam de longe komenciĝis la nova jaro. Nova jaro estas bona puŝo al novaj komencoj.

Kaj efektive, jam en Januaro, ni inaŭguris novan tipon de aktiveco: tuttagan ekskurson. Ni kuniĝis por manĝi tagmeze, kaj ni promenis sub la gvidado de Barbara posttagmeze, por malkovri la artaĵojn de la Brusela metroo. Tio eĉ estis reklamita kiel tutbelga elstara aktiveco en Eventa Servo. Legu pli pri la tago en aparta artikolo, kaj grandan dankon al Barbara.



Legu

Ankaŭ komenco de la dua kurso gvidata de Adamo, post la sukcesa fino de la unua fine de Januaro. Koran dankon al Adamo pro lia sindediĉo, kaj refoje pro la transpreno de la kursoj de Fransuaz, kiu tiom bele gvidis ilin dum multaj jaroj.

Kaj plej bele : naskiĝis nova klubo de Esperanto en Bruselo! Ĉe la universitatoj, dank'al Adamo kaj Attilio, kun helpo de Kiki, kaj kun nia klubo en la rolo de 'baptopatro'. Ankaŭ pri tio-ĉi vi legu en aparta artikolo.

Vi pagis vian kotizon por 2023, ĉu? Okaze ke vi forgesis, ne timu, vi trovos ĉiujn utilajn informojn en tiu-ĉi numero. Dank'al ĝi, vi subtenas la klubon, kaj vi indikas al la Federacio Valonio-Bruselo ke indas subvencii nin ĉar Esperanto interesas pli ol la 5 plej kutimaj ĉeestantoj. Kaj tiel vi partoprenas en tre vivoplena klubo.

Ni ja daŭrigas kun multaj aliaj aktivecoj: progresigaj kaj diverstemaj konversacioj, prelegoj, ludo-vesperoj, ekskursoj, biblioteko, retejo kaj retaj informoj, la bulteno kiun vi tenas en la manoj...

Antaŭ nelonge la klubo partoprenis en la provo de superado de Guinness mondrekordo pri multlingva laŭtlekada stafeto kaj ni sukcesis trafi 65-lingvan stafeton. Vidu en apartan artikolon.

Kaj eble ofte la plej alloga el nia oferto estas la monata Babilemaj Spagetoj. En januaro ni manĝis Hinde tagmeze okaze de la metroa ekskurso, kaj en februaro Itale vespere post lud-vespero. Marte estas tagmeze Belge. Ne hezitu proponi la sekvajn variantojn ! Ni manĝas en diversaj restoracioj, en diversaj tempoj, el diversaj kuirartoj, kaj en diversaj tagoj de la semajno.

Do, ĝis baldaŭ ĉe unu el tiuj multaj aktivecoj!

Via prezidanto, Bernard-Régis LARUE.

★ 16-28 Jun 2023 • ĈEP-Ĉebaltan Esperantista Printempo en Mielno (PL)

Pola Esperanto-Asocio Filio en GLIWICE organizas denove en la tagoj 16-28 de Junio 2023 - la 45-an **Ĉebaltan Esperantistan Printempon** kun riĉa kaj varia, alloga programo. Tiu ĉi tradicia, internacia Eo-aranĝo okazos en la agrabla ripozloko Mielno - UNIEŚCIE, situanta inter Balta Maro kaj Jamno-lago, 12 km nordokcidente de la distrikta kaj vizitinda urbo KOSZALIN.

Ili antaŭvidas kiel ĉiam partoprenon de eksterlandanoj.

Pri atrakcio de MIELNO decidas ĉefe la naturaj valoroj: sabloriĉa strando kun altiĝantaj dunoj, verda strio de pinarbaro, granda lago kaj saniga mikroklimato kun aero saturita de jodo. Ne mankas en Mielno distraĵoj, kie oni povas agrable sin amuzi.



En la programo de la 45-a ĈEP troviĝos: interesaj prelegoj kun videofilmoj, prezentado de interesaj fotoj, lingvoperfektigado por komencantoj kaj progresintoj, komuna kantado, dancado, libera tribuno de gastoj kaj promenado ĉe la marbordo. Tiuj kiuj venos nur por ripozi ĉe Balta Maro havos tiun eblecon ĉiutage. La organizantoj invitis konatan en "Esperantujo" dueton "KAJTO".

Antaŭtagmeze ĉiuj havos sufiĉe da tempo por regeneri sian sanon dum aktiva ripozado: promenado, naĝado, sunbrunigado. Oni povas ankaŭ sunumi sur la proksima strando, kreanta veran paradizon por naturamantoj. En Mielno eblas naĝi en kelkaj naĝejoj de varmigata marakvo, sed tiu plezuro estas aparte pagenda. Ĉiu povas malmultekoste pruntepreni jakton, remboaton aŭ akvobiciklon por agrable navigi tra Jamno-lago. Eblas ankaŭ viziti la lagon sur la ferdeko de atrakcia promenŝipo.

Barbara, kiu ofte partoprenis en tiu renkontiĝo, aldonas ke tradicie, multaj partoprenantoj kunportas muzik-instrumentojn. Do, restado estas tre gaja, oni multe kantas kaj dancas. Notindas ke Pola manĝaĵo estas varia kaj bongusta.

Barbara Poterucha kaj Nikolao de Buyl

Helpe de la anonco sur la retejo <http://www.esperanto.cba.pl/aktualajxo.html>

Someraj Kongresoj

La vintro finiĝas ĉi tie. Kial ne jam pensi pri la venonta somero ? Suno, varmo, feriotempo...

Tio estos okazo partopreni eble iun Esperanto-kongreson ?

La plej granda ĉiam estas la Universala Kongreso. En la 3a numero de Aktuala en 2022, mi rakontis al vi kion eblis travivi en la pasinta UK, en Montrealo. Vi povas tion relegi por havi ideon pri la ofertoj de la venonta. Ĝi okazos en Torino, granda urbo norde de Italio, tre riĉa en vizitindaĵoj, ĉar iama ĉefurbo de Piemonto kaj Savojo, do ankaŭ de Italio. Jam

gia Egipta Muzeo ege meritas viziton, kun eĉ kvin etaĝoj da antikvaj mirindaj objektoj. Notu ke pro la okazigo de UK en Italio, ne okazos la tradicia Itala Kongreso.

Ankaŭ norde de Italio okazos la junulara kongreso, IJK. Sed en Lignano Sabbiadoro. Mi vizitis tie la italan kongreson en 2012, tiel ke mi povas tre varme rekomendi al vi la lokon: temas pri tre granda tereno plena de arboj (oni ja loĝas en komfortaj ĉambroj, ne miskomprenu), laŭlonge de privata plaĝo. Ĝi estas loko kie sportistoj trejniĝas, sed do ankaŭ esperantistoj tie gastos. Kaj ne nur la junuloj, sed ankaŭ la instruistoj por la ILEI konferenco, dum alia semajno. En la IJK la etoso ĉiam bonas, ja la junuloj bonege miksas interesajn kaj distrajn programerojn.

Alia ebleco estas la Baltaj Esperanto Tagoj = BET. Ĉi-jare en Latvio, urbo Ventspils, de la 15a ĝis la 22a de Julio. Tiu kongreso miksas multajn elementojn, iomete kiel UK, sed kun malpli da partoprenantoj kaj kutime pli da muziko kaj kantado. Ĝi okazas vice en la tri baltaj landoj, kaj la litova versio ĉiam estas la plej granda kaj plej bone organizita (venonta tie en 2025). Sed ĉiuj eldonoj estas interesaj, kaj cetere ili estas ĉiam favorprezaj.

Kutime ankaŭ tre indas iri al SES = Somera Esperanto-Studado, en Slovakio. Bedaŭrinde ĝi ne okazos ĉi-jare, sed jes en 2024. SES ofertas multajn kursojn de Esperanto, sed ne nur. Jen la priskribo el ilia retejo : La programo de la aranĝo estas varia: antaŭtagmeze okazas instruado de Esperanto, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, diskutoj, laborgrupoj ktp, vespere koncertoj, teatraĵoj, diskotekoj. Ili ĝuas tre bonan reputacion, jam pro la bonega organizado. Kaj tien iras homoj de plej diversaj aĝoj, inkluzive de multaj junuloj.

Ankaŭ Greziljono proponas abundan oferton. Tiu kastelo el la Loire regiono apartenas al la esperantistoj. Tie oni organizas tra la jaro multajn staĝojn, seminariojn kaj feriajn semajnojn plej diversajn. Iuj estas temaj, aliaj estas regulaj restad-semajnoj, kun Esperanto-kursoj, sporto, atelieroj, vespera animado ktp. Ankaŭ speciala oferto por familioj kun infanoj. Kaj alia semajno por naturistoj. Ĉu vi jam vivis en kastelo ?

Kaj eble vi jam aldone ŝparu por partopreni la UKon de 2024 ?

UEA ĵus oficiale decidis ke ĝi okazos en Aruŝo¹, Tanzanio !

Verkis Bernard-Regis Larue


KLUBo en la Liberaj Universitatoj de Bruselo

Tiun tagon, la 15an de Februaro 2023 estis tre grava tago!

Renaskiĝis Esperanto-klubo en la universitatoj de Bruselo ! Jes, plurale: estas komuna klubo de VUB kaj ULB. Ja iam ili estis kune 1 universitato, kaj Esperanto celas transsalti lingvajn barilojn.

Jes, estas renaskiĝo ĉar jam ekzistis tia klubo, kiel atestas membro-karton kiun mi trovis en la personaj arkivoj de Henri La Fontaine.

Vidu la foton ĉidekstre



¹ Arusha

Sed ĉi-foje temas pri iniciato de KresKo (= Adamo) kaj Attilio. Ili celas kunigi Esperanton, lingvajn rajtojn kaj studentan folkloron! Jen la 4 celoj laŭ la prepara dokumento:

1. Disvastigi la lingvon : organizi kursojn, prelegojn, enkondukojn kaj babiltablojn.
2. Politika influo ekster la universitatoj, organizi fulmkursojn en baz- kaj mez-lernejoj.
3. Sentivigi al lingvokulturaj problematikoj (lingvaj rajtoj).
4. Kulturinterŝanĝoj (per esperanta lingvo). Vidu por Erasmus+ projekto kaj ULB/VUB (kantusoj, folklorajtoj, dialektoj ktp).

Kaj kiel ĝi nomiĝas? KLUBo : Klubo de la Liberaj Universitatoj de Bruselo.
Jen bela nomo!

La fonda kunveno okazis en VUB, dank'al invito de profesoro KristinTytgat al kunvenejo apud ŝia oficejo. Ankaŭ ĉeestis profesoro Philipp Bekaert.

Inter la junuloj ĉeestis do KresKo kaj Attilio, sed ankaŭ Finjo kaj Tabatha, kiuj ambaŭ lernas Esperanton en nia klubo kun Adamo. Tabatha cetere preparas finstudan verkon pri historio de Esperanto en Belgio, pli specife historio de la Esperanto-kluboj. Ankaŭ ĉeestis Catto, kiu studas en Gento : eĉ se la klubo estos ligita al la universitatoj de Bruselo, ĝi jes estas malferma al aliaj studentoj kaj junuloj.



Ĉeestis ankaŭ pluraj grandaj aktivuloj de Belgio, pretaj helpi la novan klubon realigi siajn celojn: Valer, fundinto de la Verdaj Skoltoj kaj ofta instruanto de fulmkursoj; Yves Nevelsteen, kiu ankaŭ jam prezentis vigle Esperanton al pluraj klasoj de mezlernejo kaj tre aktivas en pluraj Interreto-projektoj; Lode kiu ne nur tradukas, verkas kaj eldonas, sed ankaŭ ofte kunlaboras kun Yves. Fine Nikolao kaj mi ankaŭ ĉeestis. Ni ja tute pretas subteni la novan fratan klubon.

Clubkanto de KLUBo

M: Legend of Lobo

La universitato libera de Brusel'
Disiĝis en la mezo
Por kulturlingva cel'

Dum regas sur la tero
Malsana mond-atent'
Sur etaj verd-fajreroj
Blovos forta vent'!

Rekantaĵo (Bis)
KLUBo (KLUBo)
KLUBo (KLUBo)
Al nova realec'
Por popol-kuniĝo
Kaj ebriec'!

Aŭuuuuu!!!

KLUB-Krio

M: Alkohol'

KLUBo! KLUBo!
KLUBo, KLUBo, KLUBo!
Tien ĉi venis
Por amuziĝi,
Pri Esperanto fajfas ni!

Adamo regalis nin per ĉeriza biero kaj manĝetoj. Ni kantis la kanton kaj la 'krión' de la klubo, do la etoso jam tute bonis.

Ni deziras belan kaj longan vivon al la klubo. La iniciantoj havas multe da ideoj kaj grandan deziron agi, tiel ke mi ne dubas pri ilia sukceso!

Verkis Bernard-Regis Larue, fotis Adamo

Tagmanĝo kaj vizito de artaĵoj en la Brusela metroo.

Evento en Eventa Servo: <https://eventaservo.org/e/028983>

Ni tagmanĝis en la hinda restoracio **BOMBAY INN**, Rue de la Fourche 38 Greepstraat, 1000 Bruselo. Ni estis 15-ope!

Barbara POTERUCHA gvidis viziton de la artaĵoj de la Brusela metroo far belgaj artistoj.

Por tiu tago ni bezonis tuttagan biletan « BRUPASS 1 tagan » kiu estis akirebla ĉe STIB-MIVB haltejo-aŭtomatoj, metrostacioj kaj Bootik-oj por 7,80€.

Enkonduko

Kiam, en la fruaj 1960-aj jaroj, metroprojekto en Bruselo realiĝis, la projektistoj imagis ĉi tiun novan subteran reton kiel malferma, vigla kaj originala medio, el kiu Arto ne povis foresti. Ĉiuj stacioj ankaŭ devis esti malsamaj per ilia formo, aŭ per la naturo de ilia kompletigo, konservante unuecon en ilia ornamado. La vojaĝanto tiel vidas staciojn preterpasi, ĉiu dotita per atmosfero kaj de sia propra identeco en kiu tamen li trovas konstantajn elementojn, kiuj permesas al li orientiĝi.

Iom antaŭ la ekfunkciigo de la unuaj antaŭmetrostacioj, fine de 1969, estis kreita arta komisiono.

Ĝia misio estas konsili la Ministron pri Komunikado pri la elekto de artistoj, al kiuj oni povus konfidi mendojn de artaj verkoj destinitaj al ornamado de stacioj. Ĝi ankaŭ respondecas pri monitorado de projektoj kaj ilia ekzekuto.

Ekde 2015, la Arto kaj Arkitekturo-Unuo, kreita ene de la Brusela Moviĝeca Regiona Administracio kaj STIB, respondecis pri la reklamado, elekto, instalado kaj prizorgado de artaĵoj en metrostacioj. Ĝiaj rekomendoj estas submetitaj al la aprobo de la regiona Ministro pri Moviĝeblo kaj Publika Konstruo, kiu ankaŭ proponas artajn integriĝojn.

Ĝis nun pli ol 90 artaĵoj ornamas la kajojn, interetaĝojn kaj koridorojn kaj donas sian animon al la 69 stacioj de metroo kaj antaŭmetroo. Ĉiuj ĝenroj estas reprezentitaj: pentraĵoj, skulptaĵoj, fotoj, vitraloj..., same kiel ĉiuj materialoj: de kanvaso ĝis bronzo kaj de ligno ĝis vitro, inkluzive de ŝtalo.




Konscie aŭ ne, dekoj da miloj da vojaĝantoj kontaktas la nuntempan arton ĉiutage, sen limo. La verkoj kontribuas doni al la stacioj tion, kio faras ilin pli ol nur trairejo: loko de vivo. 69 stacioj estas multe! Barbara elektis por ni jenajn naŭ staciojn:

Saint-Catherine / Sint-Katelijne (Sankta Katarino)

Enkonduki la freŝecon de printempo en la metrostacion, tio estas la celo de Thierry Renard kreante sian verkon "Millefeuille". Koloraj tulipoj estas aplikataj per ekranprintado sur la muroj de la stacidomo kaj celas alporti iom da "printempa freŝeco" en la ĉiutagan vivon de preterpasantoj. La floroj ankaŭ reflektas la diversecon de individuoj: multkoloraj aŭ diskretaj, malfermitaj aŭ rezervitaj, fieraj aŭ mallaboremaj.

Por vojaĝantoj, la tulipoj sur la moleo kontraŭe estas okulfrapaj sed tamen trankviligaj, dum la proksimeco de la floroj sur la muro malantaŭ ĝi estas sufiĉe maltrankviliga.



La ĉeesto de floroj en la kelo igas la mondon pensi renverse; la ideo descendi subtere por trovi la naturon de la aera mondo. Estas ankaŭ la deziro de la artisto proponi al la spektanto per "Millefeuille" ion rilatan al la samnoma deserto: iom krome por bona tago kaj por griza tago.

ÉtangS noirs / Zwarte Vijvers (Nigraj lagetoj)

La artisto volis reprezenti la nigrajn lagetojn kiuj siatempe kuŝis en la loko de la stacio. La surfaco de tiuj ĉi lagetoj estis malklara, plena de zorgo kaj allogaj danĝeroj. Ĉio ĉi tiu atmosfero estas farita de la resonancoj de frosta malhela bluo, kun pli helaj, moveblaj makuloj de flava, verda, malva kaj bruna, kiuj lasas al vojaĝantoj la liberecon de interpreto laŭ sia imago. Ĝuste la foresto de la fascinaj lum- kaj ombro-efektoj de akvaj



Étangs Noirs /Zwarte Vijvers

reflektoj distingas ĉi tiun verkon de Burssens disde "Etang aux nymphéas" de Monet, kiun "Les Etangs Noirs" neeviteble elvokas.

La pentraĵo de Jan Burssens (4x14m) estas tre abstrakta sed la metafore inklina spektanto povas vidi plantojn, florojn, aŭtunfoliojn, reflektojn de lumo kaj suno kaj malhelan akvon. La "Etangs Noirs" estis anstataŭigitaj per domoj kaj oficejoj kie homoj vivas aŭ laboras, dum antaŭe, ekzistis la profunda trankvilo de akvo kaj planto kaj besta vivo.

Sub influo de impresionistoj, ĉefe Claude Monet, la artisto provas respeguli la akvon.

Barbara rakontis en la stacidomo anekdoton pri juna poliglota esperantisto Elly Staes kiun ŝi konis. Elly renkontis Zamenhof dum la kongreso de 1907 en Kembriĝo - iĝis 103 jarojn (vivis ĝis 1999).

Beekant

Guy Vandenbranden - abstrakta vitroartaĵo kun geometriaj formoj. Tamen plasta, fakte.




Mankis la lumo dum nia vizito, bedaŭrinde. Ĉi tiu vitralo konsistas el 15 sinsekvaj elementoj, kie la egala distribuo de la bazaj geometriaj formoj estas akompanata de regula ripeto de la koloroj. Ili revenas plurfoje sed ĉiufoje en malsamaj formoj kaj je malsamaj altecoj. Ĉi tiu integriĝo estas perfekta ĉar la komponado estas esenca parto de la muro mem kaj samtempe plenumas lumineskan funkcion. Geometria abstraktado reflektas lian serĉon de ekvilibro en kaj formoj kaj koloroj.

La horizontalaj, vertikalaj kaj diagonalaj linioj estas ligitaj unu kun la alia kaj alternas kun kvadrato, rektangulo kaj triangulo. La rilato kun la metala kaj geometria konstruo de la tegmento, la efiko de lumo, la koloro kaj la lumeco de la vitro donas al la tuto tre estetikan kaj karakteroplenan aspekton.

Simonis →

Berlinde de Bruyckere. Tapiŝo. Oni sentas sin kiel en hejmo. Trankvile. Sekure. Harmonie kuniĝas koloroj kun belaj formoj.



Simonis

Rogier

« La Koloroj de Solidareco » | 2004, estis produktita de Gino Tondat, laŭ projekto de Pjeeroo Roobjee, kaj donacita al la Brusela-Kapitala Regiono fare de "Welzijnszorg" kaj la flandra kristana laborista movado. Ĝia celo estis sentivigi publikon kaj registaran konscion pri malriĉec-rilataj temoj. Tiu ĉi laboro estas do la kulmino de granda kampanjo organizita sub la slogano "Donu koloron al solidareco". Publika partopreno rezultigis peticion subskribitan fare de 270,000 homoj, kiuj ĉiu alportis malgrandan pecon el mozaiko por simboli la agon. Temas pri mozaika bareliefo, kiu heligas la bilethalon

de la stacidomo Rogier, apud la finstacio de tramoj 25 kaj 55.

Ni ne vizitis tiun artaĵon, sed ja ĉi tiun mozaikan, kiu ankaŭ pendis en la sama stacio.

➔ *Mozaika bareliefo.*

Botanique / Kruidtuin (Botanika Ĝardeno)



Ĉi tiu verko rilatas al la metroa trafiko. Rondaj ŝtaltuboj en primaraj koloroj kaj malsamaj densecoj elvokas tramliniojn, tiel memorante ke la stacio unue estis funkciigita kiel antaŭmetroo. La teknika evoluo baziĝas ĉefe sur la modula asocio kaj la kurbeco de rondaj ŝtalaj tuboj kun ses centimetroj en diametro. La ĉefaj kulminaĵoj estas helblua, hela marblua, helverda, blanka, flava, oranĝa kaj ruĝa. La

verko havas du nomojn: « Tramizado fluida / Tramizado sinkopa »; la neoksideblaj strukturaj elementoj reflektas, per du malsamaj ritmoj, la specifan karakteron de la du aroj kiuj frontas unu la alian kaj kiuj siavice reflektas la koncepton de movado. La ŝtalo estis emajlita en la forno por pliigi sian reziston al ŝokoj kaj faciligi prizorgadon. Altreliefoj en pentritaj emajlaj tuboj unu kontraŭ la alia.

Madou

« Portretoj de Virinoj » | 2016 NORA THEYS. En 2015, la ASBL Amazone, kunlabore kun la STIB kaj la Brusela-Kapitala Regiono, faris enketon pri la uzo de publikaj transportoj kaj spaco fare de virinoj. La projekto finiĝis arte kaj simbole en la metrostacio Madou, kie honorloko ricevis kvar portretojn de Nora Theys. Ili reprezentas kvar Tenood-ajn virinojn kiuj partoprenis la enketon. Por la okazo, la stacio estis renomita Madouce. Oleo-pentrado sur kanvaso.



Stacio estis renovigita antaŭ kvin jaroj.


Ĉi tiu bareliefo subtenata de du cirklaĵoj motivoj sur la flankaj muroj de la kajo aperas kiel triumfa arko (tial ĝia titolo "Ishtar", la diino kiu donas sian nomon al unu el la pordegoj de Babilono dum la regado de Nebukadnecar). Ĉi tie, la opozicio estas malfermitaj cirkloj-kvadratoj kaj fermitaj cirkloj-kvadratoj en du tonoj. La kvin elementoj de la timpano kaj la du paneloj sur la flankmuroj formas sintezon de la figuraĵo de Gilbert Decock.



← Bareliefo en lakita ligno.

Decock mem priskribis la evoluon de la kvinparta friso tiel: "La kvadrato venas de malsupre



maldekstren, malantaŭ la malfermaj cirkloj, ĝi aperas antaŭe, kadro post kadro, ĝis ĝi iĝas fermita kapmotivo dekstren. Tiu laŭpaŝa alveno al la malfono proponas la kontinuecon de bildstrio. Ĉi tiu reguleco, tamen, estas (konscie) interrompita de la forte akcentita malferma vitro."



Laŭ iniciato de la administrantoj de la renovigado de la stacio, Jeroen de Vlaminck, artisto-fotisto, estis invitita por foti la laboron kaj preni portretojn de laboristoj en sia laborejo. Liaj fotoj reliefigas la kuraĝon kaj aŭdacon de ĉi tiuj viroj, kiuj laboras nokte por plibonigi nian ĉiutagan moveblecon. La fotisto regas ĉi tiun apartan medion, laboris tie mem. De la mez-2000-aj jaroj, li praktikis kiel fotisto sur la lokoj kie li laboris. Fotoj presitaj sur glumarkoj.

Se vi volas scii pli...

Je la fino ni parolis pri artaĵo de Hankar. Unua vizitebla artaĵo en la metroo. Tiun, pro tempomanko, ni ne vizitis. Eble venontjare ni faru tion?



Nikolao rakontis, ke la atenco de la 22-a de Marto 2016 en la stacio Maalbeek/Maelbeek detruis parton de la laboro de Benoît Van Innis. La artisto proponis anstataŭigi la difektitan freskon (situanta ĉe la enirejo sur la Chaussée d'Etterbeek-flanko) kun nova laboro omaĝe al la viktimoj, reprezentante olivarbon. Simbole trempita de mesaĝo de

espero kaj paco, « L'Olivier » estis produktita per la samaj teknikoj: emajla farbo, kiun li aplikas per peniko sur ceramikaj kaheloj, antaŭ ol baki ilin por doni materialan reziston. Poemo de la hispana verkisto Federico Garcia Lorca estas rilata al ĝi. Ĝi estis transskribita en la francan kaj la nederlandan ambaŭflanke de la laboro. Germana, hispana, angla, araba, rusa kaj ĉina tradukoj ankaŭ estis aldonitaj.

Se vi volas scii pli, nepre elŝutu la broŝuron pri la metroo. Ĝi estas disponebla en la franca, la nederlanda kaj la angla. [Jen ligilo al informoj en la franca.](#)

Raporto verkita de Yves Nevelsteen

*helpo (enhavo) de la broŝuro [Quand l'art prend le métro](#) kaj (traduko) de Google Translate.
Nikolao aldone faris kelkajn korektojn*

Esperantistoj en la Mondrekordo pri laŭtlekada stafeto

En Januaro, Ivo, nia sekretario, ricevis peton de Bram Vermeulen¹ de BIB Sophia (nederlandlingva biblioteko de Schaarbeek) por partopreni en provo de superado de jam establita mondrekordo kiu okazis en la Muzeo pri Islama Arto en Doho, Kataro la 12an-Okt-2022 kun 55 lingvoj, laŭ la libro « Le Petit Prince ». Ĝi konsistas el « plej multaj lingvoj uzataj en laŭtlekada sfafeto ».



La Skarbeka biblioteko elektis infanlibran rakonton de Leo Timers « Meneer René » kiu aludas al nia famkonata superrealisma pentristo, René Magritte, kiu ĝuste tie en Skarkeko finis sian vivon en 1967.

La organizantoj retmesaĝe prezentis al ni la manieron kiel ili antaŭvidas la eventon. Kvankam ĉiu partononto devos legi nur unu frazon (kelkfoje eĉ tre mallongan), ili unue sendis al ni la tekston de la libro (kun la frazoj numeritaj) en la nederlanda, t.e. lingvo de la originala verko (kiu tamen jam intertempe ekzistas en multaj aliaj lingvoj) por ke ni traduku la tutan tekston ĉar nur la tagon de la evento la registriĝintaj partoprenantoj ricevos la frazon kiun ili devos elparoli antaŭ la

publiko. Aliflanke por validigi lingvon, devis esti almenaŭ po unu persono kiu devis prui kapablon en la lingvo (ekz. per C1 ekzamenatestilo, ...) por certigi oficiale pri la ĝusteco de la traduko kaj ties prononcado.

Ivo, do komencis per la traduko de la teksto, kiun li sendis al kelkaj vizitantoj oftaj de nia klubo. Tiuj pristudis la tradukon, kaj dum la posta semajna kunveno en De Pianofabriek, ni

¹ Ni iam antaŭe havis kontakton kun li kadre de alia projekto por kiu ni tradukis kelkajn paĝojn de la mondfama bildstria serio « La Smurfj ». Tiu evento finfine ne okazis, sed li ja memoris nin!

interŝanĝis kaj debatis pri la teksto kiun ni grupe, finpoluris. Ni tiam decidis sendi Ivo-n De Keyzer (kiu multe laboris por la projekto) kaj Adamo-n Brooking (kiu nun prizorgas la porkomencantan kurson en nia klubo) por laŭtlegi nian ankoraŭ ne konatan frazon de la rakonto. Kaj mi, Nikolao, iros, kun miaj C1 atestiloj¹, por certigi la ĝustecon de la kunlegota frazo kaj ties bonan prononcadon.

Alveninte surloke ĉirkaŭ la 10a matene, tiun sunan sed malvarman dimanĉon, la 26an de Februaro, ni estis rekte direktita al la registriĝa tablo kie ni ricevis ŝildon kun la nomo kaj, por la legantoj, grandan ŝildon algluenda surbruste (kun granda vicnumero, 28 por Esperanto, kaj lingvonomo). Kiel certiganto, mi ankaŭ ricevis paperon sur kiu mi devos noti mian nomon, la numeron kaj nomon de la lingvo kiun mi kontrolas, kaj kian atestilon mi prezentis. Nur post la provo de rekordsuperado, mi devos redoni tiun formularon subskribita por prui ke mi validigas la ĝustecon kaj prononcon.

Antaŭ la provo, esti antaŭvidita etosvarmiga programo, prezentita en tri lingvoj (Nl-Fr-En). La prezentisto kiu ludis akordeonon, ankaŭ kunkantigis nin per la vortojn « Bonvenon » kaj poste « dankon » en ĉiuj 74 reprezentataj lingvoj, sur ekrano fonetike montritaj. Poste venis la tempo por organizi la celon de la tago. Meze de la funda muro de la granda salono, troviĝis la scenejo kun ĉiuj teknikaĵoj, je la dekstra flanko de la salono ni povis rimarki numerojn de 1 al ±80 skribitaj surplanke laŭ 4 vicoj. Tie vicas ĉiuj legantoj² laŭ la numeroj de lingvoj. Organizati la vicojn, jam prenis iom da tempo. Por fari unuan provon la legantoj devis vice iri sur la scenejon, halti ĉe la mikrofono (dum maksimume 10 sekundoj), diri la nomon de sia lingvo, foriri maldekstren el la scenejo en malplenigita parto de la salono por « stoki » la homojn post la trairado de la scenejo t.e. pli da 100 homoj (konsiderante ke por multaj lingvoj estis 2 aŭ 3 legantoj). La unua provo ja estis necesa ĉar evidentis ke la sono ne funkciis taŭge. Nur post tiu provo oni decidis ke ĉio pretas por oficiala unua provo. Unue necesis relokiĝi ĉiujn sur sia numero ĉe la alia flanko. Nun venas la celo de la tago, ĉio kaj ĉiuj pretas.

Startsignalo estas donita kaj ekaperas knabeto kun patro kiuj legas sian frazon kaj tiel sinsekvas 74 legantoj. La teksto konsistis el 69 frazoj, do, la lastaj legantoj devis restarti la rakonton de la unua frazo, nur por 5 frazoj, kaj poste la aŭtoro mem finis la duan legadon de la libro en sia lingvo, la nederlanda. Iom da tempo pli malfrue venis la oficialigo de la superado de la rekordo kun 65 lingvoj validigitaj. Ŝajne kelkaj certigantoj mankis aŭ ne redonis sian certigan formularon subskribita. Jen kial estas diferenco inter la nombroj de lingvoj legitaj kaj de tiuj kiuj valide estis enkalkulitaj.



¹ Unu skriba kaj alia parola atestiloj (ekzamenoj ne okazis en la sama sesio)

² « legantoj » en tiu artikolo povas ankaŭ esti aro de legantoj, de 1 ĝis 3, kiuj ĥore legas



Fakte ankaŭ menciindas ke en tiu evento partoprenis ne malpli ol 6 esperantistoj (vidu foton sur la kovrilpaĝo). Krom tiuj de nia grupo, ankaŭ Salvatore Finamore legis en la napolitana lingvo ⑬, Abel Massiala en la kijomba¹ lingvo ⑭ dum Heidi Goes certigis por la kijomba kaj svahila lingvoj ⑯.

Sekvis ankaŭ kelkaj intervjuoj al Adamo, ĉu de infanoj (kiuj eble estis aŭ scivolemaj, aŭ devis prepari lernejan taskon), ĉu de intervjuistino de Bruzz kun sia filmisto).

Verkis Nikolao - fotoj Nikolao kaj Adamo

Ni ĉiuj estu Tutmondaj Voĉoj

Intervjuo al Herman Deceuninck.

Aktuala: Ĉu vi povas mallonge klarigi kio estas Global Voices (en Esperanto 'Tutmondaj Voĉoj') ?

Herman: Global Voices estas reta platformo de blogantoj, civitanaj ĵurnalistoj, esploristoj, aktivistoj prilingvaj kaj pri homaj kaj ciferecaj rajtoj, sed ankaŭ de volontulaj tradukistoj el la tuta mondo, kiuj disvastigas informojn el la tuta mondo el vidpunkto de lokanoj. Ĉiuj celas konstrui pontojn trans landoj kaj lingvoj por defendi la sendependecon de la amaskomunikilaro, la malfermitecon de la interreto kaj la rajton de ĉiuj al libera opiniesprimo (libera parolo).

Global Voices formas parton de la Projekto Lingua (eo.wikipedia).

Aktuala: En kio Global Voices diferencas de alia amaskomunikilo ?

Herman: Global Voices celas doni voĉon al tiuj kiuj ne sufiĉe ricevas voĉon aŭ kiujn la ĉeftendenca gazetaro ignoras. Ni ofertas novaĵojn el la tuta mondo rakontitaj per la okuloj de volontulaj aŭtoroj, kiuj ofte prilumas temojn el alia vidpunkto aŭ angulo de la mondo, tiele ofertante alian perspektivon pri okazaĵoj.

Aktuala: Ĉu 'Tutmondaj Voĉoj' fokusas specifajn temojn ?

Herman: Apud temoj popularaj al esperantistoj kiel indiĝenaj lingvoj kaj lingvodiverseco, lingvoteknologio kaj naturmediaj temoj, ni regule raportas pri diversaj okazaĵoj en aliaj landoj. Antaŭ nelonge ni ankaŭ tradukis ekzemple intervjuon kun Leonardo Puglisi, 14-jaraĝa knabo kiu gvidas junan skipon de raportistoj de Aŭstralio kaj de eksterlande por 6News, nova novaĵretejo.

Aktuala: Ĉu Esperanto jam estis inter la pritrakitaj temoj ?

Herman: Jes, certe. Aperis dulingva artikolo en la komencaj jaroj de Tutmondaj Voĉoj kaj en tiu ĉi jaro aperis denove artikolo sub la titolo 'Esperanto: De idealismo al realismo'.



¹ « Kiyombé » estas unu el la bantuaj lingvoj parolata en la du Kongoj kaj Angolo

Aktuala: Ĉu vi mem tradukis aŭ verkis en Esperanto ?

Herman: Kvankam mi ne estas profesia tradukisto, mi deziris fari pli ol sole konsumi Esperanton, sed ankaŭ enhave pliriĉigi Esperanton. Miaj unuaj kontribuoj estis en la junulara revuo 'Kontakto' por kiu mi verkis temonumeron pri multlingveco en muziko. Alia temonumero rilatis al kaptukaj kulturoj.

Por Global Voices Esperanto mi jam faris multajn tradukojn de artikoloj, sed ankaŭ tradukis la tradukgvidilon por niaj kunlaborantoj.

Mi ankaŭ tradukis la retan kurson pri la kronviruso KOVIM-19 kiun la Monda Organizo pri Sano (angle : WHO) eldonis en Esperanto. Tamen multe da gravaj informoj pri tiu malsano restas nealireblaj en multegaj indiĝenaj lingvoj parolataj en la mondo.

Mia plej lasta traduko estis la novelo 'Perceptoj de Delvaux' de Jean Joniaux, kiu baldaŭ aperos en Japanio en formo de dulingva eldono (japana-esperanto). Mi ankaŭ preparantas artikolon pri tekst-arto, ĉar min fascinas la rilato inter arto, lingvo kaj kulturo.

Aktuala: Ĉu vi facile kaj daŭre scias motivigi kunlaborantojn ?

Herman: Ni havas kunlaborantaron en ĉiuj kontinentoj, kvankam ofte tiu situacio ne restas stabila. Ekzemple ni havis kunlaborantojn en orienta Kongo kiuj dum iu tempo povis kontribui, sed pro la daŭranta enlanda milito en ilia regiono ili devis rezigni post kiam ili ekloĝas en rifuĝejo. Ni ankaŭ jam havis peton el Norvegio de siria rifuĝinto kiu ankaŭ rezignis pro pli persona projekto. Ankaŭ juna egipta ĵurnalisto jam devis rezigni kunlabori pro politikaj cirkonstancoj kiuj devigis lin rezigni. Male al diversaj alilingvaj GV-sekcioj kiuj sciis altiri profesiajn tradukistojn aŭ studentojn pri lingvoj, nia sekcio « Global Voices - Esperanto » (eo.globalvoices.org) daŭre baraktas trovi tiajn kunlaborantojn por pluevoluigi. Ni ankaŭ ne estas esperantista organizaĵo, sed apartenas al pli granda komunumo kies komuna lingvo kutime estas la angla.

Aktuala: Kion vi opinias necesa por plia kresko de Global Voices Esperanto ?

Herman: Diskonigo de la ekzisto de tiu alternativa novaĵretejo necesas por kreskigi la nombron de legantoj kaj volontuloj. Ekzistas kunlaborpartnereco kun TEJO, sed ankaŭ vi povas helpi kreskigi ĝian abonantaron irante al 'Novaĵletero' supre maldekstre sur eo.globalvoices.org Tiuj kiuj volas aliĝi kiel kunlaboranto trovos en nia retejo ankaŭ « aliĝilon ». GVesperanto estas la nomo de nia konto en Facebook, Twitter kaj Telegram.

Ligiloj

1. Tamaro rilate al 'kulturo' en Global Voices Esperanto
2. Prelego en Esperanto pri GVE dum la IJK 2019 : www.mallonge.net/tutmondaj
3. Tutmondaj Voĉoj en Vikipedio
4. MOOC-kurso pri KOVIM-19 ĉe WHO-Online.
kaj filmeto « Mi vakciniĝis » - ambaŭ en Esperanto.



Herman Dekeŭnink estas dumviva membro de la Esperantista Brusela Grupo kaj kun-administranto de Global Voices en Esperanto (Tutmondaj Voĉoj) kune kun Manuela Burghilea.



Memorigoj

Pri la klubkotizo:

Dankon al ĉiuj kiuj jam re-aligis al EBG por 2023. Ĉu mi povas memori al la malfruuloj ne forgesi renovigi ilian kotizon al EBG ? La klubo bezonas la kotizojn por bone funkcii.

N-ro	Kodo	Kategorio	Kotizo	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2023				
11	MEM	Membro de EBG	15 €	Reta « Aktuala » Partopreno en la vivon de la Grupo Por ricevi retan AKTUALA-n nepre sendu vian retpoŝtadreson al nikolao@esperantobruselo.org
12	MEM-J	Membro - Junulo (< 26-jara)	10 €	
13	MEM-P	Membro - Pensiulo, senlaborulo		
14	FAK	Familia kunloĝanto	4 €	Partopreno en la vivon de la
15	+KUR	!! Aldona kotizo por kursanoj	+20 €	Kurso + materialoj
18	DVM	Dumviva membro de EBG	375 €	Membreco kaj presita « Aktuala » dum la tuta vivo (25 x MEM kotizo)
19	+PAK	!! Aldona pago por presita Aktuala	+9 €	Krompago por ricevi presitan version de Aktuala
20	+PAK-E	!! Aldona pago por presita Aktuala ekster Belgio	+18 €	Krompago por ricevi presitan version de Aktuala ekster Belgio

Pri VIA ĉeesto, kiel netranoktanta... en la IFEF-Kongreso de Antverpeno



Eĉ kiel netranoktanta ni bezonas vian aliĝajn datumojn, ĉu per la unua aliĝilo (por kotizoj kaj manĝoj) kaj/aŭ per la ekskurso-aliĝilo (por la ekskursoj)... kaj kompreneble vian pagon. La aliĝiloj ekzistas en pdf-formo aŭ en reta formo. Vi povas elŭti la pdf-aliĝilojn de la retejo (la pdf-on de la ekskurso-aliĝilo vi trovas je paĝo 26), aŭ plenigi la reta(j)n aliĝilo(j)n per la ligilo en la retejo. Bonvolu kontakti info@ifef2023.net

Memoru ke la adreso de la retejo estas <https://ifef2023.net>.


Se la partoprenanto volas resti dum la tuta kongreso, li aŭ ŝi pagas la kongreskotizon laŭ la diversaj kategorioj en la unua aliĝilo. Se la partoprenanto volas viziti la kongreson nur dum unu aŭ kelkaj tagoj, li aŭ ŝi povas pagi tagan kotizon de po 30 € por ĉiu mendita tago. En tiu kazo oni NE devas pagi la ĝeneralan kotizon.

Atentu tamen ke la Solena Inaŭguro je dimanĉo, la 7a de majo, inter 10 kaj 12h, estas senpaga: ĉiu esperantisto estas varme invitita. **Adreso de la Solena Inaŭguro:** Campus National de la Altlernejo Thomas More, Kronenburgstraat 62-68, 2000 Antwerpen. La konstruaĵo troviĝas tre proksime al la konata Tropika Instituto en la suda kvartalo de la urbo kaj je promendistanco de la kongresejo. **Adreso de la kongresejo:** Junulargastejo Pulcinella, Bogaardeplein 1, 2000 Antwerpen. Dimanĉon, la 7an de majo, okazos posttagmeze urba vizito kiu kostas 5 € kaj kiun oni devas mendi antaŭe. Ĝi estas mendbla per la ekskurso-aliĝilo. Atentu ke ekskursojn kaj manĝojn en la junulargastejo vi povos mendi nur ĝis la 31a de marto 2023. La dimanĉa vespera programo estas pagenda, t.e. ĉu pere de la ĝenerala kongresa kotizo, ĉu pere de taga kotizo por dimanĉo.

Floroj, kiuj nombras la helajn horojn

Kiel kalendaro la floroj rakontas, kiom da tempo pasis el la jaro. Dum la vintro la heleboro kaj la neĝborulo floras spite al neĝo kaj malvarmo; venas tiam la printempo kun krokuso kaj narciso, grapolhiacinto kaj dafodilo kaj peonio en rapida sinsekvo, kaj kun la florkaskadoj de la fruktarboj; poste la somero kun kavalirsprono kaj kaskofloro, papavo kaj cejano, sekvataj en la malfrua somero de georgino, sunfloro kaj vergo d'oro, kaj fine venas do la aŭtuno kun la krokusosimilaj nudaj virgulinoj.

La naturo funkcias kvazaŭ horloĝo. La krokusoj ne aperas je somermezo aŭ la rozoj frue en la printempo, ...



Eltirita de « La vivo de la Plantoj »

STAFETO SERIO POPULARSCIENCA

Teksto: Paul NEERGAARD

Ilustraĵo: Mad STAGE © 1957

Nia plantangulo

Centaŭreo cejano / Cejano

- *Korenbloem / Wilde korenbloem*^{NL}
- *Bleuet / Centaurée bleuet*^{FR}
- *Kornblume*^{DE}

Centaŭreo (Centaurea) estas multspecia genro el la planta familio de asteracoj, al kiu apartenas unu- kaj plurjaraj herboj,

Al la genro apartenas ĉ. 350-500 specioj, kiuj vivas ĉefe en la Mediteraneo kaj Okcidenta Azio, sed deko aperas eĉ en Mez-Eŭropo.

Mi priparolas la centaŭreon cejanon; ĝi estas bela floro, aŭ trudherbo en grenkultivo/agrikulturo, kun brile bluaj floroj, kaj lancetformaj folioj, 50 ĝis 70 cm altaj; ĝi floras de Junio ĝis Aŭgusto.

Antaŭe ĝi aperis abunde, kune kun papavoj kaj kamomiloj en grenkampoj, sed kemiaj sterkaĵoj kaj herbicidoj maloftigis ĝin. Havante multe da nektaro, ĝi allogas abelojn kaj papiliojn.

Blua koloro situas en la spektro inter cejana kaj viola.

Cejana: La nomo devenas de la floro « cejano », kies koloro tamen estas iom pli blua ol cejana.

« La koloro cejana estas inter blua kaj verda koloroj, simila al la koloro de sennuba ĉielo. Ĝia ondolongo estas inter 490 kaj 520 nm¹ », mi legas en Vikipedio.

Do, mi komprenas ke la cejano ne estas cejanblua. En pluraj lingvoj oni uzas la nomon de la floro por indiki tiun specifan blun: – germane: kornblumenblau,
– angle: cornflower blue

En la nederlanda oni eĉ uzas : korenbloew, sen la kompleta flornomo, tamen Petro De Smedt tradukas ĝin : cejanblua.

Komplika ? Mi simple ĝuas vidi tiun koloron !

Medicina uzo : prenu la freŝan aŭ sekigitan floron : jam tre longe homoj preparis infuzaĵon por resanigi bluajn okulojn (brunaj okuloj profitas de plantago). Tizano estas digestiga.

Aldono de la aŭtoro: Legante la tekston kiu akompanas la desegnon de la antaŭa paĝo, « kiel kalendaro ... » mi bedaŭras ke tio nun ne plu veras: en la bruselaj parkoj floris meze en Januaro la narcisoj, same aliaj plantoj ne plu indikas la sezonojn .

Verkis kaj fotis Lydia BUYST.



¹ nm estas simbolo de mezurunuo nanometro kiu estas 10⁹ metroj.



James Webb
Spaca Teleskopo

Mardon
25 Aprilo
2023

Prelego de Bernard-Regis Larue



Promenado en la Sonia Arbaro

Prokrastita ĝis

Sabato la 22a de Aprilo 2023

Hiacintaj flortapiŝoj

Rendevuo je la 10a40 horo ĉe tramstacio 44 (foriro 10:44) en Montgomery aŭ je la 11a ĉe tramhaltejo "Trois Couleurs / Drie Kleuren", notu ke tie ankaŭ eblas parki la veturilon laŭe de la Avenuo de Tervuren'. Eble poste, ĉ. la 13a kunmanĝo je loko difinenda. Starto de la promeno iom post la 11a.